La basgitaristo Bob Weir mortis havinte 78 jarojn

15-an de januaro, 2026

Sabate, la familio de la Usona muzikisto kaj kantverkisto Bob Weir anoncis lian morton. La eksgitaristo kaj kantisto de la rokbando Grateful Dead, kiu havis 78 jarojn. Lia familio anoncis lian morton per Instagram, rimarkinte lian lukton kontraŭ kancero, tamen li mortis pro "malsano de pulmo". La anonco ne markis la daton de la morto de Weir.

Weir ludis basgitaron kaj kantis kun Usona psikedela rokbando Grateful Dead dum jardekoj, kaj ankaŭ li verkis kelke da kantoj por la rokbando inkluzive la kanton "Sugar Magnolia".

Li ankaŭ havis longdaŭran soloistan karieron, aniĝinte al diversaj muzikgrupoj kune kun Grateful Dead alumni, kaj lundinte koncerteje ĝis kelke da monatoj antaŭ sia morto.

Weir naskiĝis havinte la nomon: Robert Hall Parber 16-an de oktobro, 1947, en San-Francisko, Kalifornio, kaj kreskiĝis en la Areo de la Golfo de San-Francisko. Li iris al lernejo en Koloradio, kie li konatiĝis kun la estonta ano: John Perry Barlow. Weir komencis la ludadon de gitaro kiam li havis 13 jarojn. 31-an de decembro, 1965, Garcia kaj Weir konsentis pri la kreado de la muzikgrupo nomata: Mother McCree’s Uptown Jug Champions, kiu poste nomiĝis la Grateful Dead.

Krome lia muzika kariero, Weir ankaŭ starigis la organizaĵon: Tamalpais Research Institute, kaj li subtenis plurajn aferojn, inkluzive: naturprotektismon, la solvon de malriĉeco, kaj aferojn rilate al belartoj.

This article is a translation of “Grateful Dead bassist Bob Weir dies, aged 78” by Wikinews contributors, originally published on Wikinews.
Source: https://en.wikinews.org/wiki/Grateful_Dead_bassist_Bob_Weir_dies,_aged_78
Licensed under Creative Commons Attribution 2.5 (https://creativecommons.org/licenses/by/2.5/)
This translation was made by Eduardus-eo. Any errors in translation are my own.